EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IFEF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 33> ● AMO 86 ● komerca zomo ● Kostariko ● Duolingo < junio 16**

# AMO 86 prezentis la sudan, oceanian mondon

La AMO-programo vizitas denove kulturan terenon – kaj temas pri kulturoj malofte prezentitaj per Esperanto. Kiel mi montris en lastatempa studo pri la libra serio Oriento-Okcidento de UEA, la Okcidento peze superas la Orienton (39 eroj kontraŭ 16, el sume 60 eldonitaj verkoj). Plie la Sudo apenaŭ rolas (unu verko) same la mez-oriento (3 verkoj). Magras kulturoj de Latin-Amerko (unu aperis pere de Hispanio), same plene mankas Afriko kaj preskaŭ tute mankas kontribuoj el la mondo de indiĝenaj kulturoj.

Por ripareti tiun mankon, por ŝtopi truon, la AMO-programo kuraĝe kaj avangarde elpaŝas, per komenca paŝo en AMO 86, kun pli kompleta elpaŝo en AMO 90 dum la tempo de la UK. Jen raporto pri AMO 86 sendita hieraŭ al la membroj de la Komisono de UEA por AMO.

“AMO 86 laŭplane kaj bonorde okazis kaj venis al fino ene de la lasta horo. Mi ege dankas al Ahmad Mamduhi kaj la iranaj kolegoj, kiuj bonege prizorgis la teknikaĵojn. Ankaŭ al Rob Moerbeek pro lingva kontrolo de la tri prezentitaj eroj.

La temo estis: 'Esperanto por peri Oceaniajn Kulturojn', kaj tio plenumiĝis per tri prezentaĵoj, unu pri Aŭstralio, unu pri Nov-Zelando kaj unu el la insularo Tahiti.

La partoprenantoj malmultis: nur 12 - el Irano (5), Rusio (2) kaj po unu en Hungario, Tanzanio, Slovenio, Brazilo, Mongolio kaj Svislando, kun unu el nedivenebla lando. Tamen, la tuto estas registrita kaj poste alireblos (nur 95 minutoj, eĉ inkluzive de demandoj kaj komentoj).



Ni alkroĉas la unuan el la tri prezentitaj kulturoj, tiun pri la aborigenoj de Aŭstralio (la bildo montras rilatan artaĵon).

La plano estas aperigi la registron en la Jutuba kanalo de UEA, intertempe trovu ĝin ĉe:

https://us02web.zoom.us/rec/share/iSZLgIh7rt_1Kzdz_M41Y0hiB6YauqlZu6FscufbpRbYJOaUQxjjFJJETHsrOwRP.UU2gDenp5y-q-xCK

## Niaj komercistoj zomas al pli vasta publiko

Ekde nun ni okazigos regulajn kunvenojn de IKEF per *Zoom* (kaj samtempe ni transperas la kunvenojn tra Voov, (vaste uzata sistemo en Ĉinio kaj tra Azio) por ke la kunvenoj estu pli internaciaj kaj pli da homoj partoprenu la eventojn.

Ni invitas vin prelegi/prezenti por niaj venontaj kunvenoj (dimanĉaj, sezonaj kaj jarkunvenoj) pri ajnaj temoj rilate al komerco, ekonomio, ekonomiko, merkatiko, ekonomia ĵurnalismo, ekonomia juro kaj kunlaborado de la fakaj asocioj ktp ktp (aŭ pri ekonomia/komerca aspekto de iu ajn el niaj fakaj temoj)! Dankon!

Dato: ĉiudimanĉe ekde nun tra 2022;
Horo: UTC 11:45-14:00 (中国时间 19:45-22:00)
Daŭre validaj informoj: Platformo: https://zoom.us
Ligilo: https://us06web.zoom.us/j/4450123381?pwd=WnZobUdaRzdsdTBLK0wyTjE4aHIxdz09
Kunvena kodo: 445 012 3381; Pasvorto: IKEF2022

Enkhee, Ĝenerala Sekretario de IKEF

## La 75a Internacia Esperanto-sumoo

En majo 2022 okazis la 75a Internacia Sumoo, en kiu partoprenis 301 homoj el 34 landoj kaj 1 regiono. Ekde la unua sumoo en septembro 2009 ĝis nun partoprenoj entute estas **16 334**. La legitaj paĝoj estis **914700 paĝoj** (egalas al 9147 libroj konsistantaj el 100 paĝoj).

Laŭlandaj partoprenintoj: Japanio 62, Francio 37, Brazilo 23, Ĉinio 23, Germanio 18, Pollando 16, Rusio 14, Italio 13, Koreio 12, Svislando 9, Sekvas la aliaj 24 landoj.

Bedaŭrinde partoprenis neniu el Oceanio. Jam de jaroj preskaŭ neniu partoprenis el Oceanio. Mi elkore atendas oceanianojn. Nia retejo: http://www.esperanto-sumoo.pl/

HORI Jasuo, 第**75**回エスペラント相撲

## Informoj el Turkio

Aperis la nova numero de nia revueto 'Turka Stelo'. Per tiu simpla revueto ni povas pliriĉiĝi kune per viaj kontribuaĵoj. Ni atendas viajn leterojn pri viaj opinioj kiel nia leganto, Plue, se vi volas sendi kontribuaĵojn en Esperanto, tio ĝojigus nin. Verkoj pri politiko, religio ktp ne estos akceptitaj. Bonvolu sendi al ni tekston pri kulturo, naciaj rakontoj, viaj rememoroj, literaturaĵoj, poemoj, ŝercoj ktp.
Malnovaj numeroj de'Turka Stelo' nun troviĝas en la jena retejo. Ankaŭ la lasta numero estas rekte legebla en la reto.
https://turkastelo.wordpress.com

## Canuto memorigata okaze de jubileo



Antaŭ 125 jaroj, la 3an de junio 1897, naskiĝis Giorgio Canuto, itala medicinisto kaj esperantisto, prezidanto de UEA (1956-60), kies nomon nun havas la fondaĵo Canuto, kiu ebligas membrecon en UEA al esperantistoj el nepagipovaj aŭ netranspagipovaj landoj. En la listo de la Esperantaj jubileoj kaj memordatoj en junio 2022 estas ankaŭ Antoni Grabowski, Sándor Szathmári, Lidia Ligęza, Vinko Ošlak, Vytautas Šilas kaj aliaj bone konataj

esperantistoj. Legu la junian liston, kompilitan de la Ruslanda ĵurnalisto Aleksander Korĵenkov, en La Ondo de Esperanto: https://sezonoj.ru/2022/06/junio-9/

## Kostariko laboras tra sia Universitato

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo. Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:

Nomo: Universitato de Kostariko
Gvidantonomo: Jorge Antonio Leoni de León
Tipo: Nova universitata kurso
Loko:: San-Joseo, Kostariko
Aldoninto: tiberido

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27425

## Kroatio lanĉis novan retejon

En januaro 2022 Mihaela Cik lanĉis novan retejon de Kroata Esperanto-Ligo. La retejo estis kreita kadre de la projekto pri heredaĵo kiun financis la Ministerio pri kulturo kaj komunikiloj. La adreso de nia retejo restis www.esperanto.hr.

La granda kolekto da informoj kaj dokumentaj materialoj kiujn kolektis Davor Klobučar, restas je la dispono de esploristoj en la arkivaj paĝoj de la retejo. Pri la nova retejo krom Mihaela aktivis Robert Milijaš, Roberto Maglica kaj Đivo Pulitika. La nova retejo estis lanĉita kadre de la unua programo de la Esperanto-Societo 'Tibor Sekelj'.

Informo laŭ la revuo Tempo, numero 139

## Lego-klube Ju-tube

Jorge Camacho parolas pri sia novelo "Neniam plu (Aboco de amo)"
en la legoklubo de Fuenlabrada Esperanto-Ligo. https://youtu.be/MfO_vFEque4

mga

## Duolingo nun en la franca

Venis post la angla, hispana kaj portugala, la kvara Esperanto-kurso ĉe Duolingo – en la franca. Per la ĝisnunaj kursoj komencas la lernadon de Esperanto proksimume 700.000 homoj ĉiujare. https://www.duolingo.com/course/eo/zh

Lu Wunsch-Rolshoven

SMG: La aldono de la franca malfermu grandajn eblojn tra la franc-parola Afriko.

## Prepare al UK en Afriko en 2024

De antaŭ iom da tempo estas kutimo instigi afrikanojn pri UK kun la espero, ke kelkaj el la landoj povus interesiĝi pri la afero kaj inviti por kunfari Universalan Kongreson de Esperanto en la kontinento. Francesco Maurelli, profitante okazon de sia laborvojaĝo en la orienta regiono de Afriko, aranĝis seminarion en tiu senco por tanzanianoj. Certe iu raporto pri la renkontiĝo kun fotoj en Tanzanio aperos en la

revuo de UEA. Antaŭe, eblas vidi kelkajn fotojn prie ĉe
https://esperantistojentanzanio.blogspot.com/
Nia foto revokas la partoprenintojn de la 6a Afrika Kongreso en 2016 el Tanzanio.

Adjévi Adjé





## Kurso en la Esperanto-urbo

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo. Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:

Nomo: Esperanto pere de libroj - eldono 2022
Gvidantonomo: Grzegorz K. JEKEL
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Herzberg am Harz, Germanio.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27426

## Dek tipaj membroj de Eo-klubo



*SMG ironie: Nia bildo montras nur kvin klubanojn. Kial? La plia kvino malfruis al la klub-kunveno. ☺*

Georgo Handzlik ludas kun la publiko per sia amuza movadeca kanto ‘Dek klubanoj’, En la 80a Hispana Esperanto-Kongreso (Comillas - 2022)
https://youtu.be/41brSpE1x5I

mga

========= vortoj: 1095 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado.
La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.